

kaj kalorioj en la dieto, pri pasteŭrizado kaj homogenizado de lakto. Ĉu ne ĉiu aŭtomobilisto konas la ĉefajn terminojn de la benzinmotoro, kaj ĉu ni ne ĉiuj konas la ĉefajn fakesprimojn de la meteorologio el ĉiutagaj antaŭdiroj de la vetero? Nia vortotrezoro kreskas de tago al tago.

Kaj kreskas la nombro de la sciencoj. Hodiaŭ laboras en la mondo pli da sciencistoj ol vivis entute da sciencistoj tra la antaŭaj jarmiloj de la homa historio ĝis la naskiĝo de la nuna generacio.

Ni estas hodiaŭ pli dependaj de la sciencaj trovaĵoj ol iam antaŭe, je la bono kaj malbono. Ni devas ĉiuj koni la ĉefajn trajtojn de la scienco por ke ni povu alpreni decidan starpunkton en la senĉesa elektado inter ĝia bonfara aplikado kaj krima misuzado. **Kontraŭ** la minaco de la atombombo, la kunlaborado kun la evoluantaj landoj. Kleriĝo ĉi tial fariĝis ĝenerala devo.

Nia internacia lingvosocio ne povas neglekti tiun devon. Eĉ krome ni devas esti internaciaj perantoj por la disvolviĝo de tiu sentado de respondeco.

La Internacia Somera Universitato grave kontribuis al tiu ĉi necesa kleriĝado de la lingvosocio de Esperanto. Dum dudek jaroj ĝi pritraktis antaŭ kelkaj miloj da esperantistoj variaĵon de sciencaj temoj pere de kompetentaj universitataj fakuloj. Tio ĉi vivigis nian lingvon en la koncernaj rilatoj, ĉiam denove demonstrante ĝian universalecon. Dum tiu ĉi semajno ni ĝuos plian serion da prelegoj.

Tamen, kiel ajn valora estas la Somera Universitato, ni ne povas kontentiĝi nur per ĝiaj kontribuadoj. Tiel gravega estas, kiel mi jam emfazis, la scienco en la nuna socio, ke estas danĝere al la vivo kaj plua disvolviĝo de Esperanto, se ne ĉiam abunde alfluadas al ĝi la sango de la scienco. La naciaj lingvosocioj havas siajn sciencajn instituciojn, siajn esplorinstitutojn kaj universitatojn, kun miloj da deĵorantoj. Aperas en la etnikaj lingvoj ĉiujare miloj da raportoj, revuoj, libroj el iliaj manoj. En la socio de la Lingvo Internacia tiu materia fundamento mankas. Kaj ĝin ni reale ne povas krei en la nunaj cirkonstancoj. Sed ni devas konscii, ke des pli urĝe estas stimuli ĉiumaniere produktadon de scienca literaturo, precipe de libroj pritraktantaj sciencajn-teknikajn temojn. Eble tio estas hodiaŭ nia plej urĝa tasko, tasko, kiu ĝis hodiaŭ estas preskaŭ komplete neglektata.

(408.92)413.164(038)(047)

**RAPORTO de la Direktoro de la SEKCIO PRI LA TEKNIKA VORTARO**  
(R. Haferkorn, Germanujo — al la Prezidanto de la Akademio de Esperanto)

Por doni sufiĉe klaran superrigardon pri la taskoj kaj la agado de la Teknika Terminologia Centro, la ĉi suba raporto inkludas ne nur la tri lastajn jarojn, sed la tutan intertempon ekde mia alelekto en la Akademion.

En januaro 1958. mi prenis sur min la postenon de la sekciestro, post kiam mi jam dum oktobro 1956. sekvis la honorplenan inviton de Prof. G. Waringhien, esti la redaktanto de la teknika-sciencia parto de la **PLENA ILUSTRITA VORTARO (PIV)**. Tial la ellaborado de sliparo por tiu teknika-sciencia parto estis dum la tiam sekvintaj jaroj unu el la plej gravaj taskoj de la sekciestro. Montriĝis ke estis vere oportune, kunigi tiun postenon en unu personon kun tiu de la Gvidanto de la **Terminologia Sekcio de ISAE**, ĉar en ĉi tiu posteno mi jam delonge vige kunlaboris kun la fakvortaristoj de la ISAE-rondo, kun la celo, unuformigi la teknikan lingvon kaj eviti ties fuŝadon.

Miaj agadoj en mia posteno de Direktoro de la Sekcio pri la Teknika Vortaro estis jenaj.

**(1) Organizado.** — Laŭ la rekomendo de la Estraro de la Akademio mi provis okupi kelke da kolegoj kiel **membrojn de la Sekcio**. Tamen mi sukcesis interesigi nur Prof. N. Kawasaki, kiu fariĝis tre fervora kunlaboranto, antaŭ ĉio rilate diskuton pri neologismoj. Krom tio membro de la Sekcio nun estas Inĝ. A. Broise, kiun oni nove alelektis en la Akademion kaj kiu estos la »Akademia Korespondanto por la Sekcio Teknika Vortaro«. Ni nun pripensos, kiamaniere disdividi la laboron inter la Sekciestro kaj la Korespondanto.

**(2) Terminologia laboro.** — Pri lingvaj problemoj mi ĉiam intime interrilatis kun la Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. Kiel ĉi supre dirite la ĉefa tasko de la sekciestro estis unue verki alfabetan sliparon de la Esperanto-terminoj por la teknika-scienca parto de PIV, bazante tion sur miaj spertoj okaze de la kompilado de la Scienco kaj Teknika Terminaro (STT) aperinta en 1956. en Tokio. Dum marto 1960. mi sendis la pretan sliparon al la ĉefredaktanto prof. Waringhien, por ke li ĝin enmetu en la manuskripton de PIV. — Paralele kun la verkado de tiu difinhava sliparo de la Esperantovortoj mi kompilis apartan sliparon G-Eo, kiu helpis min kompletigi la terminaron de diversaj specialfakoj. Por konatigi miajn spertojn al pli granda rondo de germanlingvanoj, mi aperigis la rezultojn de mia sliparo kiel »Technisches Ergänzungswörterbuch« en Germana Esp. — Revuo kio okazis laŭ monataj daŭrigoj de 1962. ĝis 1967. Dum ĉi tiu longa intertempo estis tre evoluiĝinta la teknika lingvo; krom tio mi trovis multe da eraroj en la vortaro. Dum 1967. mi sentis min devigata, verki ampleksan liston de korektoj kaj aldonoj. Malgraŭ tio nia amiko R. Eichholz en Kanado entreprenis ekigi reprodukon de mia vortaro publikigita en GER, per sia ofsetpresejo. Provpresaĵojn de tiu reprodukto mi dissendis al pluraj anoj de nia terminologia rondo kaj ricevis de ili ampleksajn listojn de korektindaĵoj. Eichholz estas preta, al la definitiva reproduktaĵo aldoni kiel korektoliston tiel ankaŭ suplementon kiu eĉ enhavos la difinojn de tiuj terminoj kiuj ne troviĝas en PV, PVs kaj PIV. Tia denova ĝisfunda tralaborado de la teknika vortaro G-Eo helpis al mi, plenigi eĉ kelke da malplenaĵoj ankoraŭ troviĝantaj en la PIV-manuskripto.

**(3) Informado al tiuj kiuj konsultas la Terminologian Centron (T. C.)** — De jaro al jaro kreskis la nombro de tiuj personoj, kiuj konsultas T. C. 'n. Okaze de tia konsultado mi registris la nomojn kaj adresojn de la respektivaj esperantistoj-fakuloj; mi aranĝis du sliparojn, unu de la nomoj, la duan ordigitan laŭ fakoj. Tiuj dokumentoj utilis por doni informojn pri serĉendaj samfakuloj.

**(4) Reviziado de fakvortar-manuskriptoj.** — Tiu ĉi tasko nun jam ampleksas konsiderindan nombron de fakoj, nome:

- a) Mi helpis nian kolegon V. Setälä pri la fotografa-optika terminaro G-Eo.
- b) Kun Mag. inĝ. K. Siwicki (Tekn. Grupo de Pola Esp. — Asocio) mi kunlaboris pri la esperantigo de la Elektroteknika Terminaro.
- c) Kun Inĝ. A. Broise (Francujo) mi intime kunlaboris pri la ĝenerala teknika vortaro, la terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj kaj la il-maŝina terminaro, kiun estas preparanta Broise.
- ĉ) Kun univ. doc. O. Reiersöl (Oslo) mi diskutis terminojn troviĝantajn en lia provizora Matematika Terminaro.
- d) Mi helpis la Aŭstrian Esp. — Instituton (Skr.: Regierungsrat E. Werner, Wien) poluri la Eo-parton de la 13-lingva »Brulŝirmvortaro« eld. de la »Comité Technique International de Prévention et l'Extinction du Feu (CTIF)« kaj aranĝi ĝin laŭ niaj principoj de unuecigo.
- e) Laŭ la peto de s-ro E. L. M. Wensing, UEA-vicprezidanto kaj prezidanto de la »Instituto por Eo en Komerco kaj Industrio« mi kunlaboris ekde 1964. en la internacia komitato por la kompilo de moderna ĝisdata, multlingva Terminaro por Komerco kaj Industrio (ĉefverkanto: S-ro F. Munniksma, Amsterdam) kaj kurante faras miajn rimarkigojn en la alvenintaj vortilistoj.
- f) Ekde 1964. mi ankaŭ helpis s-ron Maurice G. D. Jaumotte, UEA Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj delegita reto, kaj iniciatinto de la Internacia Esp. — Klubo Aŭtomobilista, verki seslingvan AUTO-TERMINARON. Mi reviziis la unuajn malnetojn de tiu fakvortaro.
- g) Mi helpis Prof. R. Gérard ĝustigi diversajn ankoraŭ dubajn terminojn en lia seslingva kompendio de Geologio.
- ĝ) Mi reviziis la manuskripton de la »Fervoja terminareto« G-Eo kaj Eo-G de G. Ritterspach, por unuformigi la teknikan lingvon.

**(5) Reviziado de tekn.-sc. traktaĵoj, varbtekstoj (prospektoj) de industriaj firmaoj ktp.**

- a) Mi lingve kaj faklingve reviziis la tradukon entreprenitan de s-ro Jack A. McCarthy (Direktoro de »Interparl«, P. O. Box 213, Monroeville, Pa., 15146, USA) pri la kompendio »The Fundamentals of Electrochemistry and Electrodeposition« de Samuel Glasstone (20 ĉapitroj, 104 paĝoj). Mi ankaŭ helpis al McCarthy, kompili terminaron Eo-A pri galvanizo kaj metaltegado. S-ro McCarthy estas membro de la »Applied research laboratory of United States Steel (USS)« en Monroeville, kaj havas konsiderindan meriton pro la enkonduko de Eo en la sciencon, nome per resumoj en fakrevuoj kaj varbiloj por teknikaj produktoj en la Internacia Lingvo.

b) Diversajn fakulojn en la industrio kaj en esplor-institutoj, kiuj konsultis la T. C. 'n, mi helpis en la traduko esperanten de teknikaj raportoj, broŝuroj kaj prospektoj ekz-e »Commissariat á l'énergie atomique — Centre d'études nucléaires de Grenoble« (Kemi-inĝ. Jean Dettwiller) kaj »Maschinenbau-A. G. B. Schilde« en Bad Hersfeld, BRD (s-ro R. Hirsch).

(6) **Propraj eldonoj de T. C.** — Sub aŭspicioj de la Terminologia Centro aperis jenaj »Projektoj de ISAE-Rekomendoj«:

- a) Esperantlingvaj aneksoj al Grupo 05 (Difinoj de fundamentaj nocioj), Grupo 10 (Elektraj maŝinoj kaj transformiloj) kaj Grupo 12 (Tranŝduktoroj) de la Internacia Elektroteknika Vortaro, dua eldono, eld. de IEC;
- b) Ĝustigoj al »Scienca kaj Teknika Terminaro« (»STT-Korekto«);
- c) Esperantlingva anekso al la deklingva terminaro »Line Transmission« eldonita de Study Group 4 (Maintenance) de CCITT, komisiono de Union Internationale des Télécommunications, 1959;
- ĉ) Terminaro pri Mikroskopio de Prof. E. Balech (Argentino).

(7) **Enketoj pri diversaj problemoj de la teknika terminologio.** —

- a) Mi verkis »Laborplanon por verkado de esperanta fakvortaro«, artikolojn pri la »Interegaligo de la faklingvoj en diversaj nacilingvoj« kaj artikolon »Internaciaj simboloj por lingvoj«.
- b) Sub aŭspicioj de T. C. kaj en intima kunlaboro kun la Akademia Sekcio pri la ĝenerala vortaro okazis enketoj pri »La legado de proporcioj de unuoj en formuloj« (apliko de la vortoj **po** aŭ **en** aŭ **por**) kaj pri la terminaro de »elektrona operaciado« (komputero, komputatoro, operaciatoro ktp.).
- c) Mi verkis, laŭ komisiono de UEA/CED indekson de sciencaj, teknikaj kaj aliaj fakvortaroj en Eo.

(8) **»El la fakoj«.** — Tiun ĉi rubrikon kurante aperantan en Scienca Revuo mi verkadas baziĝante sur mia kuranta registrado.

(9) **Grava propono.** — Dezirinde estus, fari duan eldonon de la eminenta verko de **Rollet de l'Isle** SCIENCA FUNDAMENTA ESPERANTA TERMINARO. Tion mi jam proponis antaŭ pluraj jaroj. La aŭtoro estis Ĝenerala Sekretario de ISAE kaj Direktoro de la Sekcio pri la Teknika Vortaro, do mia antaŭulo. La verko reprezentas kompendion de la fakoj matematiko, mekaniko, astronomio, fiziko, kemio, geografio, meteorologio, zoologio, botaniko kaj geologio. Ofsetpresa reproduktado ne taŭgas, ĉar oni antaŭe devos revizii la tutaĵon por konsideri aktualajn nocinomojn. Do mi proponas, fotokopii ĉiujn 84 paĝojn de la libro kaj dissendi la individuajn ĉapitrojn al la respektivaj kompetentuloj pro reviziado kaj kompletigado.

(10) **La manuskripto de PIV.** — Prof. G. Waringhien, ĉefverkisto de PIV, komence de 1967. afable disponigis al mi trakopion de la manuskripto de sia grava verko. Per tio estis eble al mi, rekonstrui la teknikan sliparon Eo-G kaj G-Eo kaj pretigi liston de ĝustigoj kaj apartan suplementon al mia TEW aperinta dum 1962/67. en GER. Tiuj korekta kaj suplementa listoj kompiliĝis en intima kunlaboro kun diversaj germanlingvanoj, inter ili ankaŭ R. Eichholz en Kanado, kiu entreprenis, reprodukti per sia ofset-presejo mian TEW kun korektolisto kaj suplemento. Tiu komuna verkado ankaŭ helpas, fari pli serioza la gigantan entreprenon de Eichholz, traduki la DUDEN-Bildwörterbuch. De nun mi kurante komparos la vortlistojn de Eichholz kun la radikoj kaj difinoj de la PIV — manuskripto.

(11) **Financaj aferoj.** — Kun la posteno de la sekciestro estas ligita ampleksa interkorespondado, de kiu iu kvoto iras konte al ISAE. La elspezoj por afranko dum jaro estas konsiderindaj. Ĉar la posteno estas kuplita kun tiu de la gvidanto de la **Terminologia Sekcio de ISAE (T. C.)**, mi ĝis nun registris ĉiujn elspezojn por afranko ŝulde al la ISAE-kaso, kun kiu mi saldis fine de ĉiu jaro. Sed se la Akademio havus propran buĝeton, mi de nun laŭeble disdividus la elspezojn inter ISAE kaj la Akademio.